

# Ateismo

Bulteno de **Ateista Tutmonda Esperanto Organizo**

<http://www.iespana.es/ateismo/a5.htm>



## La celoj de ATEO

- 1 Kunligi esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn.
- 2 Disvastigi Esperanton inter ateistoj.
- 3 Defendi propran egalrajtecon kaj kontraŭi trudadon de religio en neŭtralajn Esperanto-grupojn.
- 4 Instigi ĉe neŭtralaj Esperanto-grupoj, ke oni egale varbu por Esperanto ĉe nerekligiaj grupoj se oni varbas ĉe religiaj grupoj.
- 5 Akceli racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esperanto mem kaj strebi altigi la intelektan kaj kulturen nivelon de Esperantujo.
- 6 Libere diskuti kaj analizi ateismajn movadojn, politikojn, kaj filozofiojn kaj ĉiajn rilatajn sociajn problemojn.
- 7 Malkateni la mensojn!

*ATEO viglas: jen samideanoj en la Sveda Kongreso.*

**N° 5-a** (de la nova epoko)

**Junio 2004**

## Vortoj de l' Prezidanto:

Karaj samideanoj,

Mi ne ŝatas uzi la ĉi-supran vorton, por skribi ĝenerale al esperantistoj, sed mi tre ŝatas uzi ĝin, kiam mi alparolas vin; samideaneo prenas sian veran sencon, kiam ni parolas inter ni, ateistoj –ĉe se sufiĉe varias niaj precizaj konceptoj pri ateismo.

En la nuna mondo, tre gravas, ke ni diskonigu niajn ideojn, for de la dogmoj, for de la menskatenoj, for de ĉiuspecaj terorismoj kaj fundamentalismoj, for de la religiaj premoj kaj netoleremo.

Mi nepre deziras, ke pluvivu kaj pli aktivigu ATEO. Bedaŭrinde pro granda okupiteco profesia kaj movada (mi nun estas redaktoro de „Le Monde de l'Espéranto“, franc-esperanta magazino), mi ne povis zorgi pri pli da aktivigo de nia asocio. Ĝus forlasinte la profesian laboron, espereble mi trovos iom pli da tempo por ATEO. Mi atendas de vi ideojn kaj helpon por aktivigi la asocion. Ekzemple, la redaktoro certe ĝojus ricevi interesajn artikolojn de vi por nutri nian bultenon, kaj stimuli la pripensadon kaj diskutadon.

Alproksimiĝas la UK en Pekino, kaj ni havos dum tiu kongreso la nun tradiciigantajn programerojn: du kunvenojn, unu administra, la alia estas diskutforumo pri ateismo en Azio kaj tute aparte en Ĉinio. Ankaŭ ni havos budon en la kongresejo, dum ĉ. 2 horoj en la tago de fakaj asocioj.

Kiel estas nuntempe pri ateismo en Ĉinio ? En diversaj regionoj de la mondo, renaskiĝas religiaj sentoj, revigliĝas la partopreno en la religiaj movadoj. Ĉu same en Ĉinio ? Ĉu la eduka sistemo forbalais ĉiujn religiajn spurojn, aŭ ĉu la homoj kontraste al senreligia eduko turniĝas denove al diversaj tradiciaj kredoj, kiuj pli kontentigas ilian spiriton ? Mi esperas, ke multaj ĉinaj amikoj partoprenos en la forumo, kaj klarigos sian opinion pri tiu temo.

Ĝis baldaŭ en Pekino, ateisme via,

*Claude Nourmont*

## Mortas biciklanto

Mi devas bedaŭre informi pri morto de Kieg Eichholtz, tre libera kaj simpatia homo kiun mi konis en 2002, semajnojn antaŭ ol la UK. Li kun amikino Ivana, ambaŭ nederlandanoj, venis al mia urbo, Campinas, biciklante el San Paŭlo ĉefurbo, por iri al la malproksima urbo Foz do Iguaçu. Mi filmis tion, kaj estas eta filmo kiun mi disvendas kaj disdonas kiel interesa por esperantistoj kaj ne esperantistoj.

Mi kredas ke ili partoprenis la IJK de TEJO en urbo Pato Branco (Anaso Blanka).

Mi revidis ilin dum la UK en Fortaleza, kaj tiuj el vi kiuj partoprenis tiun UK-on eble memoras pri la biciklista paro, ĉiam vestitaj pretaj por bicikli.

Ivanan, ni renkontis dum la kunsido de ATEO. Kieg (prononcas «Kirĥ») laŭ mia sona rekono) ne partoprenis, sed mi elkovris li esti vera ateisto kiam post la fermo de la UK ni iris al la marborda avenuo por klopodi trovi lokon kun tipika muziko, por danci kaj festeni. Dum ke ni restis atendante la alvenon de Ivana biciklante, viroj kiuj stiras taksion rigardis nin, ĉefe lin, pro stranga kaj fremda aspekto. Li prenis sandviĉon el la sako de lia biciklo, kaj dum li manĝis unu el la taksiistoj petis peceton. Li donis kaj konversaciis pri biciklado, dum longaj vojaĵoj, k.t.p. La homoj miris pri li, kaj en iu momento alvenis religian mencion de unu el ili. Vi sciis ke en tiu regiono, la plejparto de la homoj estas fervore religiaj. Kaj mi profitis por traduki ke li ne estas religia homo. Li lasis do, tre bonan impreson pri nereligia kuraĝa homo.

Vi povas legi pli pri Kieg en paĝo de e-bicikla asocio:  
<http://bemi.free.fr/vikio/?KiegEichholtz>.

*Jozefo Lunazzi*



## **Internacia Esperanto- Simpozio en la Aŭstria Nacia Biblioteko**

La 8-an kaj 9-an de oktobro 2004 la Aŭstria Nacia Biblioteko en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio organizos simpozion okaze de du Esperanto-jubileoj: la centa datreveno de la naskiĝo de Lidia Zamenhof (1904-1942) kaj la 75-jariĝo de la Internacia Esperanto-Muzeo (IEM, aligita al la Aŭstria Nacia Biblioteko en 1929). Prelegos Ulrich Lins (Germanio/Japanio, ĉefpreleganto), Vilmos Benczik (Hungario), Wera kaj Detlev Blanke (Germanio), Heiner Eichner (universitato de Vieno, Aŭstrio), Alex Kaefer (Aŭstrio), Herbert Mayer (IEM, Aŭstrio), Claude Piron (Svisio).

La historio de Esperanto kaj la sorto de esperantistoj estas firme ligita al la ĝenerala historia evoluo. Verki historion de Esperanto signifas verki kadre de la historio de la mondo. Tion montris Ulrich Lins per *La danĝera lingvo*. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto. Esperanto do ne estas io ekzotika kaj margena, kiel foje opinias la ĝenerala publiko, sed ĝi estas integra parto de historiaj evoluoj.

Tiu fakto estas la elirpunkto de la simpozio, kiu pritraktas la destinon de Esperanto en la politikaj-ideologiaj

uraganoj de la pasinta jarcento, fokusante interalie la atenton al la sorto de Lidia Zamenhof (murdita en la koncentrejo Treblinka en 1942) kaj de la Internacia Esperanto-Muzeo (fermita en 1938 fare de la nazioj). Apud tio pritraktiĝos ankaŭ temoj, kiuj tuŝas la nuntempon: Kia estas hodiaŭ la situacio de Esperanto en la mondo? Kiel aspektas la rilato inter Esperanto kaj la nunaj politikaj regantoj? Kiel konduki la esperantistoj en mondo, kiu almenaŭ en la publika diskurso ege malfavoras la ideon de artefarita internacia helplingvo, sed aliflanke pere de modernaj teknologioj ofertas novajn eblecojn?

Laborlingvo dum la unua duontago de la simpozio estos la germana por la ne-Esperanta publiko la cetero disvolviĝos en Esperanto.

Paralele okazos: malfermo de ekspozicio pri la sama temo en la Internacia Esperanto-Muzeo, prezento de la noveldonita plena verkaro de Lidia Zamenhof kaj internacia Cseh-kurso por tutkomen-cantoj.

Partoprenkotizo: 50,- eŭroj, por studentoj kaj lernantoj 35,- eŭroj. Aliĝo:

[plansprachen@onb.ac.at](mailto:plansprachen@onb.ac.at)

[Christian Cimpa](#)

Sammlung fr Plansprachen und Internationales Esperanto-Museum der Österreichischen Nationalbibliothek Hofburg, Michaelerkuppel, AT-1010 WIEN

Tel.: 0043/1/ 535 5145

Internacia Esperanto-Muzeo  
Hofburg, Michaelerkuppel, AT-1010  
VIENO.

### **Enhavo**

Vortoj de l' Prezidanto .....	2
Mortas biciklanto .....	2
Feliĉan Kristnaskon .....	4
Afrikaj usonanoj por Humanismo ...	5
Kiel esti ekskomunikita .....	9
Kontraŭ la Diktaturo de Alabo .....	11
Manĉeto kaj informoj .....	12

## Kristnaskon Feliĉan!

Ĉu ne ĝenas vin, ke oni bondeziru vin okaze de Kristnasko? Nun ŝajnas, ke ĉiuj paŭzas en la batalo pro la vivo, pri ĉiutaga fiagado favore al sia propra profito, kaj ni ĉiuj estas bonaj, agrablaj kaj ni deziras plej bonon unu la aliajn, kvankam neniu malsukcesas rimarki tion, ke plej bono por kelkaj estas plej malbono por la ceteraj.



Min ja ĝenas tio pri bonaĵoj punktaj kaj sezonaj, ĉefe ĉar la okazo estas la naskiĝo de la Filo de Dio, kiu —senrigarde al tio, ĉu li estis filo de Dio, ĉu tiu ĉu ekzistas, ĉu ne— ni jam scias, ke li ne naskiĝis en Decembro. La vera papo je tiuj tempoj, Konstantino la Granda, Imperiestro de Romio, decidis je la jarcento 4-a, ke la vintraj festoj, kiujn romianoj celebris tradicie ĉirkaŭ la solstico de vintro, la 21-an de decembro, kiam la tago estas plej mallonga, okazu honore al naskiĝo-tagato de Jesuo de Nazareto. Ni scias, ke je tiuj tagoj, la Imperiestro decidis, kaj la papo obeis, ĉar temis pri povo, kiun la eklezio katolika devis gajni por la estonto. Kaj, ankaŭ, antaŭ tiu momento kristanoj ne celebris la naskiĝtagon de Jesuo ĉar ili ne sciis kiam ĝi okazis. Inter alie, ĉar ili ne legis la Evangelion, kiujn oni ne pridifinis ĝis du jarcentoj poste. Sed se oni legas tiun dokumenton zorge, oni vidos, ke ŝafistoj dormas sur la grundo, kiam anĝeloj venis diri al ili, ke *la Filo de Dio ĵus naskiĝis!* Nu, oni scias, ke en la montoj proksime al Belen' estas sufiĉe da malvarmo, kaj *vintre* estas memmortige dormi tie. Sekve, ne estis vintro, sed inter marto kaj septembro. Oni kalkulas nun, ke estis ĉirkaŭ junio.

Sed romianoj ankaŭ ne sciis pri tiuj teknikaĵoj; ili nur sciis, ke ĉiujare estas festo honore al Suno, eble festo prenita el kulto al Mitro, mezorienta diino, kaj ili festumis kaj ne sindemandis pri la afero. Ni scias, ke la popolo romia vivis nur por pano kaj spektakloj.

Sekve, Kristnasko estas renoviĝo de pagana festo, kiun en si mem ateisto ne devus trovi ĝenanta, ĉar ĝi esta certigilo, ke kristanoj estas iel ateismaj.

Sed ateistoj kutime estas etikaj personoj, kaj ne kongruas al tiu etiko, ke oni partoprenu en ĝeneralan ĝojadon okaze de trompo. Ankaŭ, estas trompo esenca en tiu bondeziroj, ĉar se oni deziras feliĉon en *Kristnasko*, oni deziras ĝin nur dum unu tago, aŭ okaze de unu tago (kelkajn horojn, fakte), datrevene de io, kio okazis antaŭ du mil jaroj —pli-malpli, ĉar kronologio oficiala ankaŭ glitas pri la ekzaktaj jaroj— kaj aldone, *La Bona Nokto* aŭ kristnaska vespero kaj la Kristnaska Tago estas nur unu aŭ du tagoj, sed kio pri la ceteraj tagoj? Tial mi preferas bondeziri feliĉajn *vintrajn festoj*, kaj al tiu, kiu ne havu ilin, deziri, ke li aŭ ŝi ankaŭ havu ilin baldaŭ.

Sekve, mi deziras feliĉan vintroferiadon al vi ĉiuj. Sed ne malsukcesu vidi ĉiuj, ke la plej bona afero fari por la ceteruloj ne estas deziri ion ajn, sed labori por aliaj homoj. Ĉiujn tagojn.

Kaj mi laboras ĉiun tagon, aŭ preskaŭ, laborante por vi tiel, ke mi sinsekve povas oferti al vi la *Gazetotekon Lanti*, kiun vi povas legi je <http://www.gazetoteko.com> de antaŭ kelkaj semajnoj, la 14-a de decembro. Mi fondis ĝin por profito al novaj kaj aktualaj esperantistoj, sed honore al pasintaj esperantistoj, kiuj parolas al ni de la pasinto, ofertante al ni sian sperton kaj agadon.

*Jesuo, decembro 2003*



## Afrikanaj Usonanoj por Humanismo

de *Ralph Dumain*


Lastatempe fondiĝis nova grupo de negraj humanistoj en Usono: Afrikanaj Usonanoj por Humanismo. La fondinto, Norm Allen, Jr., laboras ĉe eldonisto **Prometeo**, kiu eldonas humanismajn, ateismajn, kaj kontraŭsuperstiĉajn librojn kaj la revuojn **Free Inquiry** [Libera Enketado] kaj **Skeptical Inquirer** [Skeptika Esploranto].

En la printempa numero de **Free Inquiry** aperis nova “Afrikan-Usonana Humanista Deklaracio.” En ĝi menciigas diversaj konceptoj pri la kaŭzoj de la problemoj de negraj Usonanoj kaj strategioj por ties emancipigo. Oni bezonas kritikan, racion, kaj humanecan starpunkton por pritrakti ĉi tiujn kaj aliajn problemojn. Ĉar kleruloj diskutadis la socian kaj historion el eŭropocentrisma vidpunkto, malmultaj scias la kontribuojn de negroj al la humanisma tradicio.

Rasismo influas la tutan socion, inkluzive de humanistaj rondoj. Nun oni klopodas larĝigi la mondbildon de humanistoj kaj allogi negrajn usonanojn al humanismo.

Historie, la eklezioj estas la plej influaj institucioj en la negraj komunumoj, kaj negroj estas fervoraj kredantoj. Pastroj pretendas havi solvojn por sociaj problemoj. Malgraŭ multa progreso dum kelkaj jardekoj, seriozaj problemoj restas

kaj aperas novaj. Oni devas atenti la neceson de kritika pensado por socia progreso. Oni tro fidis je karismohavaj



gvidantoj. La Deklaracio mencias la problemojn de nedezirata gravediĝo, misuzon de alkoholo kaj drogoj, ekonomian progreson, transplantadon de organoj, memdependecon, kaj unuecon.

La nova organizo celas: batali kontraŭ rasismo, envicigi afrikocentran perspektivon en tutmondan perspektivon, agnoskigi la kontribuojn de afrikanoj kaj afrikdevenuloj al la mondo cele al instigi

memestimon inter negraj usonanoj kaj montri la gravecon de ĉiuj popoloj en la evoluo de monda civilizacio, instigi bonan konduton per aplikado de racia kaj scienca pensmaniero, helpi solvi problemojn per edukado kaj memfido, starigi memhelpajn grupojn kaj aliajn humanismajn aktivajojn por progresigi la negran komunumon, kaj emfazi la gravecon de edukado, inkluzive de humanisma morala edukado kaj kritika racio.

Nun mi aldonos miajn proprajn pensojn. Unue, oni demandos, kial ekzistu aparta grupo por negroj. Por respondi tiun demandon, nepras ekzameni du facetojn de la problemaro: (1) la rilatoj inter negroj kaj usonaj institucioj, (2) la rolo de religio en negra socio. Pro nia historio ekzistas (almenaŭ) du apartaj kulturoj: la blankula kaj negra. Negroj amase partoprenas en la ĝeneralaj usonaj institucioj dum apenaŭ pli ol du jardekoj. Eĉ en tiuj situacioj en kiuj blankuloj ne ekskludas negrojn aŭ eĉ volas inkluzivi ilin en siaj organizoj, persistas aparteco pri la spertaro, kulturo, socitavolo, historia konscio, vidpunkto, pensmaniero, interesoj, kaj prioritatoj de la du homgrupoj. Por ke iun interesu io, tio devas havi ian rilaton al ies vivo, bezonoj, kaj historio. La usona subkulturo de ateismo kaj humanismo ne respiegulas la kondiĉojn de la negra vivo.

Plue, religio kaj eklezio havas specialan ligitecon kun negra socio kaj ties institucia strukturo, pli ol kun eĉ la plej religia blankula grupo, pro la historio de sklaveco kaj rasapartigo. Eĉ en laboristaj

blankulaj komunumoj, la eklezio ofte ludas centran rolon, sed en la negra komunumo, la eklezio historie estis la sola institucio kaj bazo por organizado. Dum la sklavepoko oni organizis eskapojn kaj ribelojn en negraj preĝkunvenoj kaj eĉ uzis siajn religiajn kanzonojn kiel sekretan kodon por plani eskapojn al libero. Dum la rasapartiga epoko, kiam oni ekskludis negrojn el la profesioj, la universitatoj, kaj ĉiuj postenoj kaj okupoj krom la plej malaltaj kaj ŝvitigaj, kaj dum en la suda Usono negroj ne rajtis eĉ pruntepreni librojn el publika biblioteko, la negra eklezio servis kiel la ĉefa institucio por kleriĝo, profesiiĝo, rangaltiĝo, kaj suprenirado al la meza kaj (et)burga klasoj. Tial multaj negraj gvidantoj kaj eminentuloj devenas el la pastoro. Ankoraŭ aktuale, multaj negraj politikistoj inkluzive de registaranoj, estas pastroj.

La eklezio restas centro de socia vivo kaj politika organizado de la komunumo. Ĝi provizas strukturon por morala vivo kaj emocia subteno, kaj estas estimata kiel alternativo ol la ĥaoso kaj senmoraleco de la stratvivo.

Estas plua konsiderenda faktoro: en la preĝejoj de negraj laboristoj kaj kamparanoj, evidentas ke ties speco de kristanismo estas afrika religio de afrika popolo. En Usono malsamkiel en aliaj amerikaj sklavkolonioj, la sklavestroj tute kaj totalisme detruis la afrikan kulturon de siaj sklavoj, sed afrikaj kulturaj kvalitoj travivis en usonaj formoj, kiel plej frapas en muziko, danco, parolritmo, ktp. La etoso



de negra preĝejo ne estas griza, senpasia, senviva tedaĵo kia troviĝas en multaj preĝejoj de blankulaj Protestantoj; male, oni trovos emocipurigon, spiritajn ekstazojn, ekscitan kaj ritmozan kantadon kaj muzikon: t.e. Afriko travivas en malsama vesto. Temas ne pri iometa moralisma masaĝado, sed pri instrumento por inspirigo, entuziasmigo kaj kuraĝigo, ne per la nura koncepta enhavo de biblia doktrino sed per la kultura formo de esprimo kiu estas neelradikigebla. Komprenoble, tia energio povas esti sekularigata, kiel jam okazis en muziko kaj danco.

Finfine, estas la faktoro komuna al ĉiuj subpremataj popoloj: religio estas la opio de la homamaso, kiel skribis Karl Marx. Ju pli da mizero, ju pli da ekonomia kaj fizika degenero de negraj kvartaloj, des pli ekaperas sur ĉiu stratangulo novaj etaj kruaspektaj preĝejoj.

Kiu ne pripensas la socian kaj politikan historion kaj realon de la situacio, tiu neniam sukcesos amase rekruti negrojn al la ateista kaj sekular-humanista movado. La ĝisosta burĝeco de la usona humanista movado, kiu atentis nur la problemojn de propra etburĝa klaso, malebligas ties sukceson en negra komunumo eĉ inter mezklasaj negroj.

Sed ĉu ne iam ekzistis negraj ateistoj, liberpensuloj, kaj humanistoj kiuj estis ankaŭ eminentuloj? Jes ja, sed la historiaj faktoj ne estas ĝenerale konataj en ĉi tiu

prihistorie analfabeta lando. La plej famaj tiaj homoj, ekz. la sindikatestro A. Philip Randolph kaj la verkisto Richard Wright, vivis en pli frua parto de ĉi tiu jarcento, kaj agadis ekster la eklezio, kiam viglis aliaj, sekularaj institucioj:

la laborista kaj socialista movadoj, al kiuj ili apartenis.

Nur kelkaj scias ke Randolph estis ateisto kaj socialisto, kaj oni ne publikigis tiun fakton, ĉar ateismo kaj socialismo estas tabuaj en Usono. Kiam oni parolas pri la historio de la negra liberiga movado, oni parolas plejparte pri la rolo de pastroj kaj eklezioj, kies kontribuo plej videblas.

Mi opinias, ke la promociado de ateismo, liberpensismo, kaj sekulara humanismo inter negroj estas la plej grava bezono de la ateisma movado en Usono, kvankam malmultaj (eĉ malmultaj negraj ateistoj) samopinias. Malkonvenas ke la plej progresema kaj demokrata forto en usona socio estas regata de la plej reakciaj kaj kontraŭdemokrataj mondbildoj kaj institucioj.

La situacio en la negraj getoj estas pli malbonaj kaj senesperaj ol en la 1960-oj. Rasaj interrilatoj estas danĝere malbonaj. Ĉar Reagan sukcesis detrui la socialdemokratian ideon, mankas kredeblaj ideoj krom la “novkonservatismo,” t.e. la totala



regno de la merkato (kiun regas monopola kapitalo).

En tia ĉi etoso, kie mankas espero solvi problemojn per socialdemokrataj rimedoj, la burĝa naciismo kreskas pli ol iam ajn inter la negroj, kiujn manipulas la burĝaj kaj etburĝaj ideologoj, kiuj regas negrajn komunumojn, plejparte la pastroj. Oportunistaj naciismaj negraj faŝistoj (ekz. la antisemitisma islamano Louis Farrakhan) ricevas multan atenton, ne nur en negraj medioj, sed nun en la tutlandaj amaskomunikiloj. Antaŭ nelonge Farrakhan aperis je la televido plurfoje dum unu semajno, do mi konkludas, ke la usona reganta klaso decidis uzi lin por plu malampligrandigi kaj apartigi la negrajn kaj blankulajn laboristojn. Do oni havas ion kiu neniam antaŭe ekzistis: kulto kaj subkulturo de faŝismo en la negra komunumo.

Nun estas la kriza kaj ĝusta tempo organizi kampanjon por raciaj kaj humanismaj valoroj. Mi konas la fondinton S-ron Allen kaj vikle subtenas lian entreprenon. Lin tiom stimulis miaj ideoj, ke li invitis min verki ĉapitron por lia prilaborata, aperonta libro: la unua ajna libro pri la historio de uson-negra liberpensismo kaj humanismo.



Farrakhan

**Bibliografia Noto:** Aperis la jenaj ĉi-temaj artikoloj en *Free Inquiry*, vol. 10, n-ro 2, printempo 1990: “African-Americans for Humanism” [p. 4-5], “An African-American Humanist Declaration” [p. 13-15], “Rational Centre of Ghana” [Centra Oficejo por Raciismo en Ganao] [p. 15], “How much influence can humanism have on Blacks?”

[Kiom humanismo kapablas influi je negroj?] de Norm Allen, Jr. [p. 16], “The quest for humanist values” [La serĉo por humanismaj valoroj] de Ishmael Jaffree [p. 17], “Black Athena: an interview with Martin G. Bernal” (pri libro *Negra*

*Atena: La Afrik-aziaj Radikoj de Klasika Civilizacio*) [p.

18-22]. Rigardu ankaŭ pluajn artikolojn de Norm Allen, Jr. en aliaj numeroj de *Free Inquiry*: somero 1989

(vol. 9, n-ro

3): “Humanism in

the Black community” [Humanismo en la negra komunumo]; aŭtuno 1989 (vol. 9 n-ro 4): “Growing toward unbelief” [Kreskante al nekredo]; vintro 1990 (vol. 10, n-ro 1): “The African American community needs secular humanism now” [La Afrikan-usona komunumo bezonas sekularan humanismon nun].



## **Kiel esti ekskomunigita de la Katolika Eklezio ...kaj kion fari, se oni ne sukcesas**

*de Lady Zotal.*



garantias esti eksigita nerevokeble kaj definitive de la statistikoj de la Katolika Eklezio.

Kial estas dezirinde al iu ajn ateo, kiu estis baptite je sia plej tenera infaneco, ke oni ne kalkulu lin aŭ ŝin kiel unu pli el la ŝafoj de Vojtila?

Nu, respondo estas facila: ni ĉiuj scias, ke Hispanio havas konkordaton kun la Katolika Eklezio, kaj ke la rilatoj inter ties *ŝafistoj* kaj la Ŝtato estas privilegiitaj (oni vidu, ekzemple, la Hispanan Konstitucion), kaj tiuj inter-

konsentoj el bonvolo kaj larĝa profito baziĝas je la pruvita fakto, ke pro tio, ke preskaŭ ĉiuj hispanoj estis baptitaj, (ĉu ili ateas, ĉu ili dikredas, harekriŝnas, jehovatestas, ĉu iaajnas, tio pasas senrigardata), la plej multo de *hispanoj estas katolikaj*.

Tio signifas, ke tuj post baptiĝo, onia nomo kaj baptocertigilo estas registritaj por ĉiam je la arĥivoj de tiuj homoj, kiuj enspezas monon je via nomo kontraŭ parto de la budĝeto de la Ŝtato, tio estas, viaj impostoĵoj.

Sed estas du aferoj, kiujn vi povas fari rilate al rompo de tiu situacio: sukcesi esti ekskomunigita (la plej efektiva) aŭ apostati (la plej malkomplika).

Jen malgranda **Manlibro de Ekskomunikotanto**, kun ideoj, por ke vi uzu ilin. Kaj se vi



Jen la Katedralo de Seviljo, kun La Ĝiralda, sia fama turo.

opinias, ke ekskomuniko ne estas por vi, ni ankaŭ klarigas al vi kiel *apostati*.

~ Ellitiĝu frue dimanĉe matene (jes, mi konsentas, tio ja estas dura!) Prenu termobotelon bonkvalita, preferinde tian, kia havas ŝtopilon tasforman. Plenigu ĝin per varma ĉokolado, kafo, teo aŭ alia inda trinkaĵo. Metu ĝin je mansako. Serĉu la plej proksiman — aŭ plej malŝatatan — preĝejon, kaj eniru la meson je la deka horo matene, armigita per via termobotelo. Kiam la pastro komencu disdoni hostiojn, vi vicu kaj atendu vian turnon. Kiam vi ricevu la ostion, ne prenu ĝin per buŝo via, sed per via mano, tiel, kiel multaj aliaj katolikoj faras. Nun vi nur devas preni vian botelon, servi tason da varma ĉokolado, prenu vian hostion, kaj malsekigu ĝin per la likvido ĉokolada kaj manĝu ĝin kun evidenta plezuro fronte al la nazo de la preĝisto. Estas grave, ke vi ruktu poste. Vi estos ekskomunikigita tuj.

~ Iru, ekzemple, al preĝejo *Granda Povo* de Seviljo kun ŝildo algluebla de Sevljo Futbala Teamo (atentu!, ne tiu de l' *Betis!*), polarojda kamero kaj reguligita futbalpilko. Senbrue, gluu la ŝildeton je la brusto de la robo de Kristo, atentante ne damaĝi la skulptaĵon (ĉar ĝi ja temas pri artaĵo!, kaj ni nur estas ekskomunikigotoj, ne vandaloj, ĉu ne?) Metu la pilkon je la piedoj de Kristo. Serĉu la pastron, kaj petu al li, ke li prenu foton de vi apud la totemo futbala. Vi estos ekskomunikigata tuj, sed povus okazi, ke ankoraŭ ne...

~ Venu en Katedralon (je mia ekzemplo, tian de Seviljo), zorgante, ke tiam diras meson la episkopo, je memorebla festeno religia, ekzemple en Pasko; kaj kiam ekestos momento da silento, vi kantu tre laŭte la *Himnon de Riego* (kiu, kiel ni ĉiu scias, estas la himnon oficialan de la Dua Hispana Respubliko, kiam oni abunde brulis multe da preĝejojn...) Verŝajne, oni ekskomunikos vin, kaj se ne, multaj furiozaj dikredantoj linĉos vin kaj vi

povos viziti Dion Patron kaj peti lin mem, ke li rekte ekskomuniku vin. Kun iom da bonŝanco, oni ne metos krucon sur via ĉerko.

~ Ankaŭ je Pasko, venu al Seviljo (*osu!*, ke *arte, mi arma*, popoldiraĵo sevilja, signifante, ke oni ĝojas esti tie). Atendu ĝis Sankta Sabato, kiam la procesio de la Sankta Entombigo faru sian oficialan vojon, sekvata de sia bizara sekvantaro, en kiu estas reprezentantoj de la tri povoj de Hispanio: preĝistoj, la armeo kaj politikistoj. Kiam la kardinalo aŭ episkopo estu proksime al vi, vi levu vian pugnon, kaj kantu *La internacian* tiom laŭte, kiom vi povos. Vi estos ekskomunikita tuj. Se ne, vi ripetu la aferon dekfoje.

~ Serĉu maldikan, malfortan preĝiston (kio ja estas malfacile trovi; dika, forta preĝisto estas malkonvene al vi, pro evidentaj kialoj). Alproksimiĝu al li senhezite, kaj dirante nenion, batu lin dufoje. Bati preĝiston havas egan ekskomunikon.

~ Tiun ĉi estas la plej efektiva maniero esti ekskomunikita, kaj ankaŭ estas jam provita je la praktiko kun 100% da sukceso. Sed ĝin oni povas fari nur je la aparta cirkonstanco, ke via filino estu subaĝulino (kaj plej bone, se ŝi estas nikaŭ, tre malriĉa kaj inter 8 kaj 9 jaraĝa) estis perfortita de degenerito, kaj iĝis gravedigita. Serĉu kuraciston, kiu abortigu ŝin, ĉar la infanino jam suferis sufiĉe da traŭmo, kaj ankaŭ ŝia vivo estas en danĝero. Gajnos ekskomunikon tujan vi, via edzino, via filino kaj la doktoro. Sed ne la perfortisto, ĉar porkoj estas filoj de dio.

Se vi konsideras, ke la afero esti ekskomunikita estas tro komplika kaj malinda por vi, ankaŭ estas la dua opcio: apostato. Ni parolos pri tio venontfoje.

**Zotal**



## Kontraŭ la Diktatoreco de Alaho

de *Leono Trockiĵ*  
el anglalingva traduko tradukis  
*R. Dumain*

[...] Tute evidente kaj nedisputeble, nuntempe ni ne povas meti nian kontraŭreligian propagandadon ĉe la nivelo de senpera batalo kontraŭ Dio. Tio ne sufiĉas por ni. Ni elradikigas mistikismon per materiismo, unuavice per larĝigo de la kolektiva sperto de la homamasoj, instigante ilian aktivan influon je socion, larĝigante la horizonton de ilia pozitiva scio, kaj baze de ĉi tio ni batu ankaŭ laŭnecese kontraŭ religiaj antaŭjuĝoj.

[...] Kiel junulo Marx diris: «la kritiko al religio estas la bazo de ĉia cetera kritiko.» Kiusence? Tiel ke religio estas speco de fikcia scio pri la universo. Ĉi tiu fikcio havas du fontojn: la malforteco de la homo rilate al naturo, kaj la *malkohereco de sociaj rilatoj*. Timante naturon aŭ ĝin ignorante, povante analizi sociajn rilatojn aŭ ilin ignorante, la homo en socio celis kontentigi siajn bezonojn per kreado de fantazioj, dotante ilin per imagita realeco, kaj surgenuiĝante antaŭ propraj kreaĵoj. La bazo de ĉi tiu kreado estas la praktika bezono de la homo orienti sin, kiu siavice devenas de la kondiĉoj de la lukto por ekzisto.

Religio estas provata adaptaĵo al medio por sukcesi je la lukto por ekzisto. En ĉi tiu adaptaĵo estas praktikaj kaj taŭgaj reguloj. Sed en ĉi ĉio intermiksiĝas mitoj, fantazioj, superstiĉoj, nereala scio.

Kiel la disvolvo de kulturo estas la akumulado de scio kaj lerto, tiel la kritikado al religio estas la bazo por ĉia cetera kritikado. Por malŝtopi la vojon por ĝusta kaj reala scio, necesas forigi fikcian scion. Ĉi tiu propozicio validas nur kiam oni konsideras la demandon kiel tuton. Historie, ne nur je individuaj kazoj sed en la evoluo de tutaj klasoj, realaj scioj intermiksiĝas diversforme kaj diversproporcie

kun religiaj antaŭjuĝoj. La lukto kontraŭ iu religio aŭ religio ĝenerale kaj mitoj kaj superstiĉoj, kutime sukcesas nur kiam tiu religia ideologio konflikta kun la bezonoj de iu klaso en nova socia medio. Alivorte, kiam la akumulado de scioj kaj la bezono de scioj ne kongruas kun la strukturo de la nerealaj veroj de religio, tiam unu frapo per kritika tranĉilo kelkfoje sufiĉas, kaj la ŝelo de religio defalas.

[...] La tuta aboligo de religio estos atingita nur kiam ekzistas plene evoluigita socialisma sistemo, t.e., teknologio kiu liberigas la homon el ĉia malnobliga dependeco je naturo. Tio atingeblas nur en sociaj rilatoj kiuj estas liberigitaj el mistero, kiuj estas tute klaraj kaj kiuj ne subpremas homojn. Religio tradukas la kaoson de naturo kaj la kaoson de sociaj rilatoj en la lingvon de fantaziaj imagoj. Nur la aboligo de surtera kaoso povas fini por ĉiam ties religian reflektan...

[Ĉi tiu teksto estas ĉerpita el parolado «Leninismo kaj Laboristaj Kluboĵ» je la 17-a de julio 1924. Anglalingvanoj povas trovi ĝin en *Problems of Everyday Life and Other Writings on Culture and Science* (New York: Monad Press, 1973.)]

*N.d.I.T.:: Ne aperas ĉi tie longaj priskriboj de specifaj faktoj kaj rimedoj rilataj al la tiutempaj kondiĉoj de kamparana, neevoluinta, novsovetia socio. Sed ankaŭ tiuj partoj de la tuta teksto reliefigas la grandan kontraston inter la metodoj de Trockiĵ kaj de Stalin pri agmaniero kaj popolklerigo pri religio kaj ateismo. La emfazojn en ĉi tiu teksto aldonis mi, ĉar nuntempe manko de scienco kaj teknologio kaj rezultaj superstiĉoj pri naturo ne estas plu grava problemo en industriigitaj landoj. Religio restas kaj eĉ plifortiĝas, ankaŭ en Sovetunio kaj orienta Eŭropo, ĝuste pro mistifiko kaj malkontentiga stato de sociaj rilatoj. Unuaprioritate, nuntempaj ateistoj devas kompreni tion.*

**Fonto:** Trockiĵ, Leono [Trotsky, Leon]. “El Kontraŭreligia Propagando”, el anglalingva traduko tradukis R. Dumain, *Ateismo* 3:1-3(7-9), januaro-septembro 1991, p. 20-21. Traduko devenas de anglalingva kompilaĵo *Problemoj de Ĉiutaga Vivo kaj Aliaj Verkoj pri Kulturo kaj Scienco*.

# Ateismo

## Organo de ATEO

**REDAKCIO: Poŝtkesto 4461,  
E30080 MURCIA,  
HISPANIO**

**Retskribu al  
jesuo@ono.com**

### *GRAVAJNOTOJ:*

- 1 Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.
- 2 Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon**.
- 3 Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mis-traktas iun ajn personon.
- 4 Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.

**Kovrilo:** *Samideanoj Civi kaj Nourmont deĵoras ĉe la atea budo dum la Universala Kongreso de Svedio.*

*Prezidanto:* **Claude Nourmont**, el Luksemburgio.

*Vizprezidanto:* **Neil Blonstein**, el Usono.

Sekretario: **Helga Rapley**, el Francio.

Kasisto: **Dieter Rooke**, el Svislando.

Helpanto

pri specifaj taskoj: **Anna**

**Lowenstein**, el Italio.

*Redaktoro:* **Jesuo de las Heras**, el Hispanio.

